ANTAŬEN suplemento de Informilo 1/26 Marto 2018

❖❖❖

rabado (Hyderabad) 5,7 milionoj, Bengaluro (Bengaluru) 5,3 milionoj.

La rivero Gango (Ganga) estas plej grava sankta rivero en Barato. Ĝi naskiĝas en la Himalaja montaro kaj longas je 3 090 km. Entute en Barato ekzistas sep sanktaj riveroj. La plej alta monto estas Kanĉenĝango. Ĝi estas 8 598 metrojn alta kaj ĝi estas la tria plej alta monto en la mondo.

La plej antikva historio de la loko datiĝas ekde la tria jarmilo antaŭ nia erao. La tri plej disvastigitaj religioj estas hinduismo, islamo kaj kristanismo, sekvas sikismo kaj budhismo. La socio estas mult-etna kaj multkultura. Ekzistas pli ol mil lingvoj kaj dialektoj, sed agnoskitaj estas 22 oficialaj lingvoj. En pli edukita medio oni parolas ankaŭ la anglan.

La ĉefa agrikultura produkto estas rizo. Krome estas kultivataj grajnoj – tritiko kaj milio, kotono, juto, moruso. El leguminozoj plej oftas fazeoloj, lentoj kaj pizoj, plie sojo, sezamo, sukerkano, nuksoj, teoplantoj kaj subtropikaj fruktoj: bananoj, mangoj kaj citrusoj.

El politika vidpunkto temas pri federacio kun socialisma kaj demokrata parlamenta organo, foje agnoskata kiel la plej granda demokratio en la mondo.
Ĝi membras en la Komunumo de Nacioj (Brita Regnaro), havas nukleajn armilojn kaj disponas propran kosman programon. La unua barata kosmonaŭto estas Rakesh Sharma.

La ekonomio de Barato atingas post Ĉinio la plej altan kreskon en la mondo. Plie Barato estas konsiderata kiel unu el la plej gravaj potencoj.
Kutime oni iras al Barato por admiri monumentojn, antikvan arkitekturon kaj rafinecon de artaĵoj, renkonti homojn aŭ spiritan influon, ĝui la naturon, okulfrapajn kolorojn kaj odorojn de spicoj, akrajn manĝojn, dolĉajn trinkaĵojn, gustumi variaĵojn de ekzotikaj fruktoj kaj legomoj.

Tamen oni renkontas ankaŭ alian realecon: ekstreman malriĉecon, poluon, putran malbonodoron, neimageblan tumulton. Tristas vidi almozulojn, malriĉajn familiojn meze de bruletantaj rubaĵoj, ĥaosan trafikon kaj seninterrompan bruon. Kontraste ĝojigas rigardo al belegaj barataj virinoj kun longaj densaj nigraj haroj, vestitaj en koloraj sarioj. Tiel aspektas la unua impreso pri Barato.

La vivo en Barato estas malfacila por la plej granda parto de la loĝantoj, por eŭropanoj preskaŭ neimagebla. Oni havas la impreson troviĝi sur alia planedo. En regiono, kie naskiĝis la plejparto de la religioj, kie ĉarlatanoj kaŝas siajn sekretojn, kie la artistoj kaj muzikistoj transdonas sian ĉarmon kaj homan ĝentilecon, kie oni povas baniĝi en la sankta Gango-rivero, vidi sanktajn bovinojn libere promenantaj sur la stratoj kaj meze de homamaso aŭ renkonti elefantojn kaj admiri mirindajn pejzaĝojn, ne devus elreviĝi la vojaĝanto.

Granda parto de la naturaj elementoj havas por baratanoj sanktan karakteron. Barata arkitekturo fiksiĝas en ĝiaj historio, kulturo, tradicio kaj religio. Antikvaj monumentoj speciale impresas ĉiun vizitanton. Barato estas la lando de grandaj kontrastoj: lukso kaj mizero. Ĝi povas plaĉi aŭ malplaĉi. Malfacilas priskribi ĝin, necesas malkovri kaj sperti mem. Gastoj certe ĝuas neordinarajn aventurojn, kiuj donas ĝojon kaj deziron reveni kaj ankoraŭ pli profunde konatiĝi kun ĝi. Ni estis bonŝancaj gustumi almenaŭ peceton de ĝi.

Ĝenerale la **trafiko en Barato** estas densa kaj ne havas regulojn. Fakte havas, sed neniu respektas ilin. Ŝoforoj mem kreis siajn proprajn trafikregulojn. Ne ekzistas vojstrioj, gajnas la plej granda, potenca kaj laŭta vehiklo. Hupado avertas preterpasantojn kaj aliajn trafikantojn pri eventuala danĝero. Tamen, ŝajne ne estas multaj kolizioj kaj akcidentoj, sed jes oftaj ŝtopiĝoj.

Kolkato estas la lasta barata urbo, kie oni trovas homojn tirantajn rikiŝojn. Kelkaj el ili eĉ ne posedas ŝuojn kaj nudpiede kondukas pasaĝerojn aŭ transportas varon tra malpuraj stratoj de la urbo.

Interesa estas la maniero kolekti monon en buso. Krom la ŝoforo la buson akompanas konduktoro. Li ne bezonas havi monujon ĉe mane, kolektitan monon li metas inter la fingroj de sia mano kaj lerte manipulas la monbiletojn.

Kolkato estas la ĉefa komerca kaj financa centro kaj la plej grava urbo de orienta kaj nord-orienta Barato. Stratoj estas inundataj de komerco kaj diversspecaj bazaroj. La homoj svarmas kiel formikoj de loko al loko.

La plimulto el la loĝantaro de la urbo Kolkato konsistas el bengalaj homoj. Nepalanoj, ĉinoj, tamiloj kaj pluraj aliaj minoritatoj troveblas malpli grandaj.

La barata manĝo estas varia pro diversaj kulturoj kaj kultivadoj de cerealoj. Same kiel en ĉiuj aliaj landoj, en Barato la manĝaĵoj malsamas laŭ la regionoj. Ĉe la marbordo la homoj ŝatas manĝi fiŝojn. Ĉiuj manĝoj estas tre spicitaj. En la norda parto oni multe konsumas seke bakitan platan panon. La plej populara kaj ĉiutaga manĝo birjáni konsistas principe el rizo kun aldonaj saŭcoj, densa supo el leguminozoj kaj peklitaj legomoj. Post la manĝo oni kutimas trinki akvon, acidan lakton aŭ jogurton.

La manĝoj estas transdonataj sur metala telero kun dividoj por diversaj komponantoj aŭ estas uzataj malgrandaj pelvetoj, en kiujn oni metas la manĝon. Foje estas uzata bananfolio anstataŭ telero. Estas kutimo manĝi per fingroj de la dekstra mano. En manĝejoj kaj restoracioj estas angulo, kie oni povas purigi la manojn.

En Barato oni ĉefe manĝas vegetare. Manĝoj estas kutime tre spicitaj. Manĝaĵoj kun viando estas influitaj de muzulmanoj. La plej ŝatata estas kokidaĵo kaj ŝafaĵo. Oni ne manĝas bovaĵon, ĉar la bovinoj tie estas sanktaj. En temploj oni oferas manĝaĵon al sanktuloj kaj dioj.

Baratanoj ŝatas manĝi surstrate, kie oni kuiras de mateno ĝis malfrua vespero. La manĝo estas ĉiam je dispono. En bazaroj

oni trovas diversajn specojn de nutraĵoj, kondimentoj, legomoj kaj fruktoj, por eksterlandanoj foje ekzotikaj.

En la trajno ĉiam eblas aĉeti manĝaĵetojn kaj trinkaĵojn de vendistoj, kiuj ĉiumomente pasas tien-reen tra la koridoro kaj proponas ion ajn. Eblas ankaŭ mendi la tag- kaj vespermanĝon. La manĝoj estas servataj sur aluminiaj aŭ plastaj teleroj, kiujn la manĝintoj poste ĵetas tra la fenestro eksteren.
En la haltejoj sur la kajoj jam atendas vendistoj kun pretaj nutraĵoj por servi vin.

TRAJN-VOJAĜADO EN BARATO

Aŭtune 2015 ni spertis kun grupo de nepalaj esperantistoj interesan trajnvojaĝon en Barato. De la urbo Gorakhpur, kiu troviĝas en la norda parto de Barato, ni vojaĝis ĝis la sudo al la urbo Chennai (Ĉenajo). La vojaĝo konsistis el tri etapoj: Gorakhpur – Chennai, Chennai – Kolkata kaj Kolkata – New Jalpaguri. La plej vasta fervojreto en Azio troviĝas en Barato.

Preskaŭ la tuta lando havas alireblecon al la fervojo, escepte de kelkaj montaraj regionoj en la nordo kaj nordoriento. Proksimume 11 000 trajnoj cirkulas ĉiutage tra la lando.
La veturado per trajno ne multe kostas en Barato. La stacidomo de la urbo Gorakhpur tre imponas kaj posedas la plej longan

fervojan kajon en la mondo, pri kio oni prave fieras. La kajo longas 1366 metrojn. Sur la reloj, laŭ unu kajo povas samtempe halti du trajnoj, ĉiu el ili havante ĝis 26 vagonojn. Estas konate, ke la barataj trajnoj longas kelkcentojn da metroj. La pasaĝertrajno konsistas el diversaj kategorioj de vagonoj.

Ni elektis la plej simplan kaj malmultekostan kuŝvagonon. Unua impreso ne tro allogas. Malgrandaj fenestroj kun kradoj elvokas vagonojn por brutaro. Dum la tago oni sidas kaj nur vespere oni levas mezan kuŝliton. Oni povas ankaŭ kuŝi dumtage en la supra parto. Tiuspeca trajno ne disponas pri litaĵoj, kelkaj homoj mem alportas kovrilon. Estas tri niveloj de kuŝlokoj, ĉe la koridoro kontraŭ la fenestroj estas nur du kuŝlokoj. Sur la plafono estas fiksitaj grandegaj ventumiloj. Lumigiloj kaj aliaj elektroinstalaĵoj foje ne funkcias. Necesejo estas tre malpura, apude en la koridoro estas lavujo sen sapo, super ĝi pendas spegulo. Fojfoje venas purigistoj dungitaj de la fervojkompanio. Sed ankaŭ okazas, ke venas junaj knaboj por purigi la plankon postulante monon.

Dum la vojaĝo la eksteraj pordoj estas konstante malfermitaj ambaŭflanke kaj la homoj staras aŭ sidas ĉe ili. Iuj ankaŭ alsaltas veturantan trajnon. En la trajno eblas mendi tagmeze kaj vespere manĝon, kiun oni pretigas en unu el la vagonoj. Post la konsumado la malplenaj skatoloj kaj boteloj estas ĵetataj tra la fenestro. Laŭvoje amasiĝas rubaĵoj. En la trajno mem ne estas ujoj, por meti tien la restaĵojn, do la homoj ĉion ĵetas eksteren.

Rubujoj troviĝas kutime sur la kajo. Tra la vagonoj senĉese pasadas vendistoj kiuj proponas kafon, teon, akvon, manĝaĵojn, fruktojn, nuksojn, ŝtofojn, librojn, gazetojn, infanludilojn kaj multajn aliajn utilajn aŭ neutilajn aĵojn.

De tempo al tempo aperas almozuloj kaj iuj religiuloj. En la stacioj, kie la trajno haltas, atendas vendistoj kaj proponas ĉefe trinkaĵojn kaj diversajn manĝaĵojn, foje pretigatajn antaŭ la okuloj de la vojaĝanto. Plej okulfrapas homoj kaj bestoj libere promenantaj inter la reloj. Sur la kajoj ofte promenadas hundoj, kaproj, porkoj kaj eĉ simioj. Apud nia trajno trankvile paŝadis zebuo rigardante la pasaĝerojn.
Entute ni trajnvojaĝis 4 334 kilometrojn kaj en la trajno ni pasigis proksimume 110 horojn kun neforgeseblaj memoraĵoj.

La urbo **Gorakhpur** estas universitata urbo en la norda parto de Barato, ne tro malproksime de la nepala limpasejo Sonauli. Ĝi havas iom pli ol unu milionon da loĝantoj. Gorakhpur estis hejmo de la mezepoka hinda sanktulo Gorakshanath, tial la urbo altiris pilgrimantojn. En la 12-a jarcento islama reganto konkeris la tutan regionon. La britoj regis la urbon inter 1803 kaj 1947, dume ribelo okazis en la jaro 1857 kaj tertremo en 1934. En Gorakhpur estas kvar stacidomoj kaj ankaŭ flughaveno en la proksimeco.

Gorakhpur Junction railway station estas grava fervoja nodo. De ĝi trafikas trajnoj al grandaj urboj de Barato – Chennai

(Madras), Dehradun, Gwalior, Kolkata, Delhi, Mumbai kaj Varanasi. La 6-an de oktobro 2013 Gorakhpur iĝis la urbo kun la plej longa fervoja kajo de la mondo kun longeco de 1,35 km.

Gorakhpur estas religia centro kaj en ĝi troviĝas pluraj historiaj budhismaj kaj hinduismaj temploj kaj aliaj allogaj lokoj. Inter la plej elstaraj temploj estas tiu de Gorakshanath.

En la proksimeco de la stacidomo eblas admiri imponan memormonumenton de la maharaĝo Pratap, nacia heroo, kiu batalis kontraŭ la imperio en la 16-a jarcento. En unu el la urbaj parkoj troviĝas statuo de Jawaharlal Nehru, (Ĝavaharlal Nehru 1889 – 1964) kun kolombo, simbolo de paco, en la mano. Li estis konata politikisto, la unua ĉefministro de la lando. Ankaŭ lia filino Indira Gandhi estis grava kaj konata politikistino. La trafiko en la urbo estas tre ĥaosa. Inter aŭtomobiloj, motorcikloj, aŭtobusoj, taksioj, bicikloj, rikiŝoj kaj homoj, libere promenadas diversaj bestoj, kaj sur la stratoj bovinoj senĝene serĉas ion por manĝi.

La urbo **Ĉenajo** (Chennai, ĝis la jaro 1996 konata sub la nomo Madras) estas ĉefurbo kaj havenurbo kun grava industria centro de Barato, situanta ĉe la bengala golfo. Ĝi estis fondita en la jaro 1639 el malgranda vilaĝo de fiŝistoj. Nuntempe ĝi havas pli ol sep milionojn da loĝantoj kaj estas la plej granda urbo de

ekstremsudo kaj la kvara plej granda urbo en Barato. Ĉenajo posedas du flughavenojn: nacian kaj internacian. Ĝi povas ankaŭ fieri pri Marina Beach, la dua plej longa plaĝo en la mondo. La 26-an de decembro 2004 ĝi suferis pro cunamo.

La nomo Ĉenajo signifas bela urbo. Ĉu ĝi estas vere bela, pri tio oni povas dubi. Densa trafiko, malpuraĵoj ĉie en la urbo, tumulto de svarmantaj homoj kaj malpura aero, unuavide ne donas bonan impreson. Alloga estas la parko Vandalur Zoo. Ĝi posedas pli ol 170 speciojn de mamuloj, birdoj kaj reptilioj. Ankaŭ krokodiloj estas bredataj tie.

En la Nacia muzeo troviĝas multaj kaj variaj eksponaĵoj. Majeste aspektas la templo Kapaleeshwarar, kiu troviĝas en la komerca centro de la urbo. Ĝi estas unu el la plej antikvaj hinduismaj temploj de Barato, konstruita en la 17-a jarcento kaj dediĉita al la dio Ŝivo. Ĉenajo estas elstara kultura centro, konata pro artaj festivaloj de la barata kulturo. Vizitinda estas amuzparko kun multaj allogaĵoj por familioj kun infanoj kaj por lernejanoj.

La urbo **Kolkato** situas ĉe la delto de la rivero Gango (Ganga), ĉe la enfluo de ĝia brako Huglo (Hooghly) en la golfon de Bengalo, parto de la Hinda Oceano. Kolkato estas la tria plej granda urbo en Barato. Ĝi kuŝas 10 metrojn super la marnivelo. En la urbo mem vivas pli ol kvin milionoj da loĝantoj. Kun la ĉirkaŭaĵo ĝi havas 15 milionojn. La historio de la urbo komenciĝis en la 17-a jarcento, kiam kuniĝis kelkaj vilaĝoj. En la 18-a jarcento ĝi fariĝis por ne longa tempo la ĉefurbo de la brita kolonio Hindio, poste ĝis la jaro 1947 de Bengalio.

Ĝi estas nomata urbo de palacoj. Unu el la plej admirindaj lokoj estas Victoria Memorial, konstruita el blanka marmoro en renesanc-itala stilo inter la jaroj 1906 kaj 1921 por memorigo de la reĝino Victoria, iama imperiestrino ankaŭ de Hindio. Ĝi estas ĉirkaŭata de belega ĝardeno laŭ angla stilo. Ĝia silueto speguliĝas en apuda baseno. Nigra anĝelo el bronzo sur la pinto de la kupolo reprezentas triumfon. Ĉe la enirhalo la vizitantoj admiras imponan monumenton de la reĝino Viktoria.

La plej signifoplena loko por loĝantoj de Kolkato kaj alloga por turistoj estas la tiel nomata Kalighat. La templo konstruita en 1809 sur la loko de iu jam antaŭe ekzistanta sanktejo. Ne tre rimarkenda laŭ la arkitekta aspekto, sed interesa pro la religieca ĉirkaŭaĵo. Ĝi estas tre frekventata pilgrimloko. Malantaŭ la oferaĵoj oni povas vidi en niĉo la nigran sanktulinon Káli, kiu estas dekoraciita per oro kaj arĝento. Ĝi simbolas detruan energion kaj postulas sangoviktimojn. Ĉiutage estas oferata kaprido. En la ĉirkaŭaĵo vagadas malriĉuloj, almozuloj, kriplaj bestoj kaj homoj.

Aŭtune en Barato estas celebrata la plej aprezata festo Durgapudza, la reveno de la diino Durga al sia naskiĝlando. Loĝantoj preparas grandiozajn, lukse ornamitajn konstruaĵojn Pandaly,

por specialaj ritoj. Ili modlas el koto diversajn homfigurojn, kiujn ili poste farbas kaj bele vestas por dekoracii la internon.

Tre alloga kaj vizitata estas la scienca areo **Science city**, la plej granda en Barato. Temas pri speciala centro inaŭgurita en 1997. Ĝi estas eduka loko por ĉiuj aĝoj kun diversaj ekspozicioj kaj eksperimentoj bazitaj sur sciencaj konceptoj. Kombiniĝas distriĝo kun edukado. Teknologiaj inventaĵoj, panoramaj videoj, interaktivaj ludoj provokas scivolon ne nur ĉe infanoj. Ne mankas diversspecaj dinosaŭroj.

Alia vizitinda loko estas ekologia urba parko kun eblo promeni per barko. Surloke troviĝas pluraj areoj kun malsamaj aktivaĵoj por familioj kun infanoj. Agrabla promenejo ĉirkaŭ la lago kondukas al bambua, bonsaja, roza kaj kakta ĝardenoj kaj ankaŭ al bela muzika fontano.

Fotis kaj skribis Liba kaj Floreal Gabalda

Noto de la redakcio:

Niaj legantoj scias, ke la suplemento Antaŭen havadas kvaronjare nur 4 paĝojn. Sed la redakcio ne volis tiom interesan raportaĵon disdividi, do ni publikigas ĝin al vi la tutan. Eble la sekvan Antaŭen ni ellasos.